

STRATEGIA PLANO

2018-2020



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Ĉi tiu dokumento estas propono
de la Estraro de TEJO 2017-2018

SEKCIO 1:

JUNULARA MOVADO

A. Plibonigi la sciojn kaj organizajn kapablojn

Movado konsistas el kolektiva agado, kiu ĉefe fontas el la kontribuoj kaj iniciatoj de aktivuloj volontaj krei ŝanĝon en la socio. Konsciigi ilin pri la aktualaj defioj de la socio estas grava paŝo por engaĝi junulojn al aktiva civitaneco. Kapabligi per neformala edukado ebligas pli kvalitan partoprenon de la junularo, kaj produktas pli efikan agadon, cele al kreado de socio pli inkluziva, internacia, interkompreniĝa kaj rajtrespekta.

- Plifortigo de la valoro kaj uzado de la Aktivula Akademio.
- Kapabligo de diverslandaj aktivuloj per ĉeestaj trejnadoj kaj spertinterŝanĝoj.
- Kreado de Mentora Programo.
- Kreskado kvante kaj lande rilate al volontuloj per Eŭropa Junulara Servo.
- Klerigo pri aktualaj politiktemoj en la junularcivitana socio kaj ĝiaj ligoj al Esperanto.
- Kompetentigi niajn aktivulojn pri lingvopolitiko.
- Plikvalitigo kaj internaciigo de nia trejnistaro.

B. Krei kunlaboron kun aliaj organizoj kaj sentebliĝi pri lingva justeco

Por konstrui socion inkluziva kaj internacia gravas pledi por lingva justeco kaj lingva diverseco kaj konsciigi pri la lingva flanko de inkluziveco, kontraŭdiskriminacio, lingvaj rajtoj kaj disvolvigi komprenon pri la kontribuo de Esperanto al tiu temaro. Tiucele necesas krei la necesajn kondiĉojn por pli efika ekstera agado kaj konstrui reton da organizoj por labori pri komunaj temoj.

- Starigo de eksterrilataj teamoj en strategiaj urboj.
- Akreditigo de TEJO en internaciaj organizoj por pledi ĉe ili.
- Partneriĝo kunlabore kun aliaj lingvorientitaj organizoj kaj junularoj de politikaj grupoj.
- Kreado de reto da kontaktoj kun decidfarantoj.
- Engaĝado de la Esperanto-junularo en strukturita dialogo.
- Kunkampanjado pri inkluziveco, kontraŭdiskriminacio, lingvaj rajtoj kaj lingva justeco.
- Umado kun naciaj junularaj konsilioj tra kaj por niaj landaj sekcioj.
- Subteno de aktiva partoprenado de TEJO-aktivuloj al kernaj junularaj eventoj.

C. Havi pli kvalitan aleksteran komunikadon

Ni vidas la neceson fari ŝanĝojn al la alekstera mutlingva komunikado de nia socia movado por porti ĝin al la 21-a jarcento, kun novaj formatoj, provizante profesiajn rimedojn por ke oni ne devu reinventi la radon ĉiufoje, kaj fokusiĝante pri interreto.

- Provizado de reuzeblaj varbmaterioj.
- Produktado de filmeto pri la internacia junulara komunumo por neesperantistoj.
- Kreado de kolektujo de sociretaj enhavoj por landaj sekcioj.
- Liverado de profesiaj retpaĝaroj, fokuse por landaj sekcioj.
- Kolektado de personaj spertoj diskonigindaj de aktivuloj kaj esperantistoj.
- Kreado de tradukteamo, ĉefe por varbmaterioj, projektoj kaj kampanjoj.
- Okazigo de pli kvalita alekstera informado per evoluigo de la TEJO-paĝaro.

SEKCIO 2:

ORGANIZA DISVOLVIĜO

D. Krei sistemon por engaĝado en TEJO kaj pli forta ligo kun landaj sekcioj

Por engaĝi junulojn al aktiva nacia kaj internacia socia agado kun transkultura interkompreniĝo ni bezonas krei sistemon kiu kontribuas al transscidonado, aplikado de strategioj kaj plifortigo de rilatoj, ĉefe kun niaj landaj sekcioj.

- Disvolvado de strategio por varbado kaj mobilizado de novaj homfortoj.
- Fortigo kaj kreskigo de nia internacia junulara reto.
- Prizorgado de sistemo kiu faciligas la enposteniĝon kaj ekagadon.
- Atingado de pli bona mezurado de nia agado kaj komunikado pri ĝi.
- Kapablokonstruado de niaj landaj sekcioj.
- Engaĝado de landaj sekcioj en komunaj projektoj eŭropaj kaj ekstereŭropaj.

E. Certigi daŭripovan financon strukturon en TEJO

Por atingi la pli suprajn celarojn, necesas saĝa kaj daŭripova modelo kiu ebligu trovi la necesajn financajn rimedojn. Tiucele necesas diversiĝi la enspezfontojn kaj progresigi la financon mastrumadon.

- Enkonduko kaj evoluigo de negocmodeloj.
- Gvidado de landaj sekcioj al financa fortigo en strategiaj landoj.
- Planado de donackampanjoj por subteni niajn projektojn.
- Reformado de la membreco-sistemo, kiu havas influon sur niaj financaj rezultoj.
- Esplorado pri novaj monfontoj, ekzemple privataj fondaĵoj.
- Organizado de subvencipetado kun niaj landaj sekcioj kaj aliaj partneroj.
- Progresigo de analizado, monitorado kaj raportado pri niaj financoj.